

La bildaj paneloj de la ekspozicio Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI-802/250, k36, 1979 februaro 22, 24

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ekde la komenco de januaro kaj ĝis pasko estas vizitebla en la Nacia Biblioteko en Berno vasta ekspozicio pri la temo "Esperanto kaj Interlingvistiko en Svislando". Ni jam havis la okazon disaŭdigi pri ĝi intervjuon, kiu reliefigis la originalecon de tiu ĉi ekspozicio.

A.- Perradie ne estas facile raporti pri ekspozicio. Ni tamen provos doni al vi ideon pri la ĉefa originaleco de tiu ĉi ekspozicio, tio estas pri la paneloj, kiuj pendas super la vitrinoj. Ili havas informan karakteron kaj grafike ili estas elstaraj. Ili donas al la tuto grandan unuecon kaj imponan karakteron.

Cl.- Ĉiu panelo havas titolon kvarlingvan. La klarigoj estas donitaj en esperanto kaj en la lingvoj germana, franca kaj itala. Povas esti, ke tio malfaciligas tujan komprenon, sed samtempe tio konstante memorigas pri la plurlingveco de Svislando kaj de la hodiaŭa mondo kaj pri la skriba aspekto de esperanto.

A.- Pluraj paneloj havas nur bildan karakteron. Krom la kvarlingva titolo nur per fotoj aŭ desegnaĵoj ili alportas la necesajn sciigojn. Ni hodiaŭ priskribos kelkajn el tiuj ĉi bildaj paneloj. Inter ili oni tuj rimarkas la enkondukan panelon, kies titolo estas "Svislando fronte al la 3500 lingvoj de la mondo". Sur ĝi oni vidas bombon el gazet titoloj en plej diversaj kaj nekonataj lingvoj, kiu falas sur svison, kiu staras timigita sur sia malgranda lando.

Cl.- Tre bela estas la bilda panelo pri Kultura Centro Esperantista. Fotoj alportas ideon pri la diversaj aspektoj de ĝia aktiveco: en neĝa pejzaĝo staras la domoj Ernest Naville kaj Pierre Bovet; sekvas rigardo al la sekretarieja kaj libroserva aktivecoj; poste oni ricevas ideon pri kurso de Internacia FERIA Altlernejo; apude infanoj manlaboras, plenkreskuloj kafumas kaj diskutas; pedagogoj pretigas instrumaterialon. Kelkaj fotoj montras kie troviĝas la koncerna centro: skilifto allogas la sportemulojn kaj vojo instigas al promenado. Oni vidas la urbon esti en valo ĉirkaŭita de belaj montoj. Tiuj ĉi fotoj ne seke viciĝas. Kontraŭe ili dancetas, alportante al la tuto impreson de vivo kaj freŝeco. Oni sentas, ke tre lerta grafikisto ilin ordigis.

A.- Tiun ĉi senton, ke la panelojn faris artisto grafike tre kapabla oni tui ricevas vizitante la ekspozicion, kaj tio favoras la komprenon al la kompleksaj temoj kaj enhavo de la aranĝo. Se inter la paneloj regas granda unueco, ili tamen estas stile kaj enhave ege variaj.

Cl.- La panelo "Esperanto: la pionira periodo" havas ekzemple tre klasikan prezenton. Ambaŭflanke de malnova foto pri esperanto-renkontiĝo du simbolaj bildoj altiras la atenton: maldekstre kvar flugantaj virinoj turnas ĉirkaŭ la terglobo; ili simbolas la komercon, la religion, la artojn kaj la laboron. Dekstre sur alia terglobo esperanto-ŝipo veturas al la konkero de la mondo. La mezon de la panelo okupas tri bildoj: komerca propaganda gazeto kun la portreto de Zamenhof pravas, ke jam en 1908 firmaoj provis vendi siajn varojn al la esperantistoj; en la centro la instruisto Tiberio Morariu gvidas Ĉe-metodan kurson; dekstre nuda atleta staranta antaŭ sunleviĝo ĉe larĝhorizonta pejzaĝo simbolas la kreon de Universala

Esperanto-Asocio. Fine sube vi povas admiri, kiel la esperantistoj propagandis esperanton en la komenco de la jarcento pere de dekoraciitaj ĉaroj, kiujn ĉevaloj tiras pilgrime en urba strato. Dekstre disvolvigas ekzerco ruĝkruca en la kadro de universala kongreso. La tuta panelo donas impreson de granda klasika ekvilibro.

A.- Tiujn ĉi tre riĉajn panelojn oni emas trankvile rigardi. Kaj jam tiu ĉi nura rigardado povus okupi preskaŭ unu horon. Kiam oni scias, ke sub ili vitrinoj kun multaj dokumentoj sin proponas al la rigardantoj, oni komprenas la gravecon de la ekspozicio.

Cl.- La admirantoj de Julio Baghy tuj rimarkas alian bildpanelon, kies titolo diras: "Ili plenvivas Esperanton." Ĝi konsistas el tri partoj. La supran duonon de la afiŝo okupas tre bela portreto de la verkisto kaj vera ekspozicio de liaj libroj reproduktitaj sur nigra fono. Oni ekkonscias pri la beleco de tiuj verkoj, kiuj grafike kaj titole tre originalas: tiel sin proponas al legado la romanoj, noveloj kaj poeziaĵoj viktimoj, la teatra korbo, pilgrimo, verdaj donkiĥotoj, hura!, ĉielarko, sonĝe sub pomarbo, sur sanga tero, dancu - marionetoj! La rigardantoj de tiu ĉi panelo komprenas, ke la esperantistoj plenvivas esperanton verkante aŭ legante kaj intimiĝante kun unu aŭtoro. Da aliajn manierojn plenvivi esperanton ankoraŭ proponas la panelo, tio per granda karikaturado de Hans Jakob, tiama direktoro de UEA kaj per aro da fotoj montranta homojn, kiuj amuziĝas kaj ekskursas. Dum kelkaj administras, aliaj ĝuas pri la sociaj rilatoj en la kadro de renkontiĝoj.

A.- La kolektemuloj longe ekzamenas la panelon, kiu titolas "Per Esperanto eksterlanden". Nur per kongresaj markoj gluitaj kun multe da vivo sur nigra fono ĝi invitas partopreni kongresojn, kursojn kaj konferencojn en la tuta mondo. La marko de la 9-a universala kongreso okazinta en Berno en 1913 okupas fakte kvaronon de la afiŝo. Sur ĝi junulo enbrakas la terglobo: tre bela simbolo de nia celado. La aliaj markoj raportas pri kongresoj aŭ kulturaj aranĝoj okazintaj en Tokio, Helsinko, Wurburg, Malmö, Novjorko, Budapeŝto, Bruselo, Villach, Bergamo, Cornella, Doksy kaj Gresillon; Universalaj Kongresoj, SAT-kongresoj, fervojistaj kaj landaj aranĝoj, someraj kursoj. La rigardanto ricevas pozitivan impreson pri tiuj renkontiĝoj pro la varieco de tiuj ĉi markoj kaj ilia grafika originaleco.

Cl.- La kolektemuloj ankaŭ ariĝas antaŭ alia panelo, kiu prezentas junulon sidantan ĉe tablo kovrita de poŝtmarkkolekto. Li diras: per esperanto mi havas korespondantojn en la tuta mondo! Super kaj sub tiu ĉi granda foto troviĝas reproduktaj de esperanto-poŝtmarkoj kaj de interesaj kongresaj poŝtstampoj. Titolas tiu ĉi panelo "Esperanto faciligas kolektadon kaj interŝanĝojn."

A.- Post pasko tiu ĉi ekspozicio komencos migradi de urbo al urbo kun la necesaj titoloj kaj enhav-plibonigoj. Anstataŭ prezenti ĝin en fermitaj ejoj, ni esperas povi ĝin ekspozicii en la montro-fenestroj de magazenoj.

Cl.- La venontan semajnon ni prezentos al vi panelojn, kiuj surhavas skribajn klarigojn.

A.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gracond. Ĝis reaŭdo!